# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 11/02/2021 Kvincentdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au


## Entute 815,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **294,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **242,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **219,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **60,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde majo 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 20 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




**N.ro 22 de "Por Komencantoj".**



Kiam oni intencas uzi la fiksitajn gramatikoregulojn kaj nur la oficialajn vortojn, Esperanto ne bezonas ŝanĝati, escepte por kelkaj novaj vortoj por novaj teĥnikaĵoj kaj kulturaĵoj en tiuj tre maloftaj kazoj kie vortkunmetaĵoj de oficialaj radikoj ne eblas. Ankaŭ du aŭ tri gramatikaj uzaĵoj ne ĝustas, sed kelkaj Esperantistoj jam komencis korekti tiujn. Do la nova Esperantisto uzu nur la oficialajn vortojn kaj lasu neologismojn al la kelkaj spertuloj kiuj deziras provi tiujn novaĵojn.

Unu maniero por emfazi vorton aŭ esprimon en via teksto estas meti tiun parton en la komencon de via frazo, se ĝi ne estas Subjekto. Jen kelkaj ekzemploj: "Li ne sentis la doloron: bonŝance DORMIS li anstataŭe"; "RESTI hejme nun mi multe preferus"; "Jozefino? Anoncis sin por helpi nur ŜI.". "SPINACON mi multe preferas". Kaj: "EL ĈIUJ INFANOJ nur venis LA DUONO.".

*Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.

**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko**

Pesto-masko. Dum la 1300aj jaroj 50% ĝis 60% da la homaro peste mortis.



## Kiam anoj de la Esperanto Ligo de Okcidenta Aŭstralio kunvenis por festi Zamenhof Tagon 2020, Trish O'Connor prezentis la jenan informon al la grupo:-




Mi ricevis retmesaĝon kaj foton de amikino en Londono, kiu diris al mi ke ŝi ĵus vizitis optikiston en Golders Green, en domo kiu nomiĝas ***Zamenhof House***. Golders Green estas populara, juda distrikto de Londono, do mi decidis esplori la konstruaĵon en la foto. Mi trovis ke oni nomis la domon honore al Adamo Zamenhof (1888-1940), filo de pola okulisto Doktoro L. L. Zamenhof (1859-1917) kiu kreis la internacian lingvon, Esperanto. Adam Zamenhof estis fama kuracisto kaj oftalmologo kiu inventis rimedon por kontroli nevidpovajn lokojn en la okulo. Estas multe pli por eltrovi (perrete) pri Adam Zamenhof kaj la mirinda interrilato inter li kaj lia patro, Ludoviko. *TRISH O'CONNOR*

## Rilate al la artikolo de Peter Weide AE516

Mi mencias ke en Hungario estas oficiala memortago por memori la viktimojn de komunismaj diktaturoj. Krome estas ankaŭ memortago por memori la viktimojn de naziismo. Laŭ "*Le livre noir du communisme*" cent milionoj da homoj estiĝis viktimoj de diversaj komunismaj reĝimoj. Estas konate ke amase estiĝis viktimoj dum la tuta homa historio, ekzemple kiam okcidenteŭropaj landoj koloniigis Afrikon kaj amase kaptis sklavojn por vendi ilin al amerikaj blankaj farmeroj. Ankaŭ amase estiĝis viktimoj kiam oni okupis Amerikon kaj Aŭstralion, kie granda parto de la origina loĝantaro pereis. Ktp, ktp. La homa historio estas historio de militoj kaj bataladoj. Bonvolu legi mian eseon pri tiu temo titolita "Paco kaj militoj en Eŭropo post la dua mondmilito" en www.verkoj.com/verkistoj/markus-gabor/ se vi interesiĝas pri tiu temo. *Gabor Markus*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



# La Manlia Esperanto-Klubo



Ni havis bonan estadon ĉe Manlia Plaĝo lastan sabaton kaj la mateno pliboniĝis pro la ĉeesto de Rogero post kelkaj semajnoj. Tiam li mankis al ni. Do ni tri kune, felice babiladis pri la mondo.



Mi ankaŭ ĝuis legi la libron de Pip Williams. Kiel rava surprizo rigardi la esperantojn frazojn. Mi scivolas ĉu ŝi estas esperantisto? *Chris Holliss*

# Nov-Zelando,



Se la nomo ŝanĝiĝus, ĝi devus esti Aotearoo, ĉu ne?
*Margaret Furness*, SA

# la 26a de januaro



En Australiaj Esperantistoj n°516 Ueli Haenni demandas kial la 26a de januaro estas ĝoja festo por parto de la aŭstralianoj kaj malĝoja por la aliaj .

Tradicie la britoj diras ke ili "malkovris" Aŭstralion , tiam Terra aŭstralis . La 10an de oktobro 1835 la guberniestro Bourke deklaris ke la insulo estas " Terra nullius" (nenies tero) do la britoj rajtis "pace" setli sur tero, kiu apartenis al neniu antaŭ ilia alveno.

Kiam en 1901 kreiĝis la " Commonwealth of Aŭstralia" alivorte kiam la nova lando estis sufiĉe forta por iom sendependiĝi de Britujo - tamen ne tute ,Aŭstralio kaj Britujo daŭre komune havas la reĝinon Elizabeth 2an kiel ŝtatestron - la konstitucio estis skribita en la spirito de Terra Nullius.

Kompreneble tiu vidpunkto ne respegulas la realon . Oni taksas ke la aborigenoj vivis ĉi tie seninterompe dum 40 000 /60 000 jaroj . Estas sufiĉe da pruvoj . La espero estis ke iamaniere la aborigenoj malaperos kaj la problemo estos solvita.

Sed tio ne okazis: la aborigenoj ja daŭre estas vivantaj kaj ne povas akcepti la historion laŭ la brita versio. Do dum la registaro kaj parto de la loĝantaro celebras la alvenon de la kapitano Arthur Phillip sur la insulon kaj la hisadon de la brita flago en Sydney Cove la 26an de januaro 1788, alia parto de la loĝantaro - la aborigenoj , kompreneble - konsideras la 26an de januaro kiel la tagon de invado , kiu ŝanĝis ilian vivon.

Tre malrapide la ĉeesto de la aborigenoj estas agnoskata : en 1967 referendumo donis al la aborigenoj la rajton esti enkalkulitaj en la nombrado de loĝantoj .

Post longa proceso la tribunalo juĝis ke la Meriam popolo estas la tradicia posedanto de la insuloj Murray kaj jaron poste en 1993 la parlamento voĉdonis la "*Native Title Act*" kiu rekonas la rajton kaj intereson de la aborigenoj kaj loĝantoj de Torres Strait insulo je ilia tero kaj akvo laŭ iliaj tradiciaj kutimoj .



Ĝis ne estas rekono de la vera historio de Aŭstralio , la eventoj pri kiuj certa grupo fieras, restos sufero por la aliaj *FranciskaToubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# "La Melburna Esperanto-klubo rekomencas kunvenojn ĉe Ross House





. Ni kunvenos la 1an kaj 3an lundon en la monato de 6.30ptm ĝis 8.30 ptm. Espereble ni baldaŭ renkontos vin tie" *Heather Heldzingen*

## El Adelajdo Legogrupo, feb4

Post monatoj da virtualaj renkontiĝoj la adelajdaj esperantistoj rekomencis renkontiĝadi en sia malnova renkontiĝejo: la Ŝtata Biblioteko. La 4-an de februaro fizike ĉeestis Trevor Steele (fotis), Eileen Jones, Andrew Woods, Cathy Taggart kaj Libby Mortimer. Kelkaj membroj de la grupo ĉeestis distance, per Zoom: Bob Felby, Brendan kaj Carol Linnane. Amike, *Katja Steele*





## Unu-hora intervjuo kun Nicole Else

Stela estas denaska Esperanto-parolanto, 30 jara kun hungara patrino kaj franca patro. Ŝi kreis serion de 10 podkastoj pri uzo de Esperanto en familioj. Jen ŝi skribis hieraŭ en sia novaĵletero : "Hodiaŭ venas la lasta epizodo de la serio pri Esperanto en la familio. Kaj kredu min, ĝi estas tre speciala. Mi babiladas kun Nicole Else." https://anchor.fm/stela-besenyei-merger

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



En tiu intervjuo mi parolas pri miaj geavoj, gepatroj kaj ankaŭ aliaj familianoj. Mi pensas, ke miaj geavoj lernis Esperanton en 1920. Mia avino partoprenis la Universalan Kongreson en Prago en 1921 (antaŭ 100 jaroj!). Ŝia lasta Universala Kongreso estis en Lucerno en 1979 kiun ankaŭ miaj gepatroj kaj mi partoprenis. Ŝi tiam estis 90 jara. Mi aldonas foton de mi kun miaj geavoj en 1975.

Amike, Nicole Else 

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# Geedziĝi diverse

## LA UNIVERSIĜADO .

Kiam ni parolas pri la universo, ni parolas pri ĝi kvazaŭ ĝi estas objekto. Sed ŝajnas al mi, ke ĝi neniam estas objekto, ĉar ĝi ĉiumomente moviĝas antaŭen. Ĝi "universas", aŭ ĝi "universiĝas". Nenio iam haltas, ĉio ĉiam estas en movo, en la senhalta tempo. Ankaŭ ni mem, tre videble, kaj nia tablo, tre nevideble. Aŭ ĉu kelkaj "objektoj" estas neŝanĝiĝantaj sed samtempe moviĝas en la tempo, en la universado? Se ni ne povas trovi la respondon pri tio, ĉu iu eble povas krei religion pri tio? Kvazaŭ proponon al la sciencistoj por studi la aferon. Mi provizore enuas, ke mi ne scias ĉu mia tablo estas objekto, aŭ ĉu ĝi estas moviĝo en la tempo. Marcel.

## ĈU GEEDZIĜI AŬ ĈU GEEDZIĜI ?

Kelkaj homoj diras, ke la oficiala geedziĝo okazas nur pro monaj motivoj. Mi opinias, ke oficialaj geedziĝoj okazas nur pro aliaj motivoj kaj ne pro financaj ialoj. Mi havas spertojn pri tio, ĉar antaŭ la dua mondmilito, do dum 25 jaroj el de 1915 ĝis 1939, miaj gepatroj kunvivis kaj havis gefilojn sammaniere kiel oficialaj geedzoj sed sen oficialaj geedziĝformularoj. Kaj ne pro financaj ialoj, ĉar ambaŭ povis havi monon en la banko, kaj ili kapablis posedi kune bankokontojn kaj domon. Ili povis havi ankaŭ diversajn testamentojn kaj asekurojn. Kaj mia fratino kaj mi neniam dubis ke ni kvar estis edzeca familio. Kiam aliaj homoj demandis al ni kiel ni sentas esti neoficiala familio, ni nur diris ke tio faras neniun diferencon al ni. Kaj ĉiuj, eĉ la oficialaj instancoj, konsideris niajn gepatrojn kiel geedzojn. Kaj la motivo por neoficialiĝo? Nur por montri ke tiaj aferoj, same kiel religioj, estas privataj aferoj kaj ke la registaro ne havu la rajton enmiksi sin en tio. Kaj tio ne estas financa afero.

La nura avantaĝo por geedziĝi oficiale estas, ke kelkaj, precipe religiaj, organizoj postulas oficialan geedziĝon. Sed tiaj organizoj malpliiĝas, kaj oni ne bezonas ilin.

Plej multaj homoj uzas la oficialan geedzecon por devigi la partneron resti la tutan vivon fidela. Ankaŭ tio ne estas financa afero, sed afero de kredo. Precipe en la t.n. Okcidenta Mondo oni pli kaj pli konscias, ke edziĝo dependu de amo kaj de la deziro prizorgi la gefilojn.

**_Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE_**



Amo (seksema) plej ofte daŭras ĉirkaŭ kvin jarojn. Se post tiu periodo la amo turniĝas al alia persono, oni deziras kunvivi kun tiu alia persono. La amon oni ne kreas mem, ĝi estas devigata kaj kreata de la naturo, do ĝi estas neevitebla "volo de Dio". Oni kompreneble kapablas subpremi kaj malobei tiun Agon de Dio, kaj ofte volas fari tion, pro gefiloj aŭ pro aliaj ialoj. Sed ĝi ne malaperas, dum kelkaj jaroj almenaŭ. Ne malofte unu partnero, aŭ ambaŭ, decidas havi ambaŭ, praktiki la seksan amon kaj resti en la familio. Aŭ aranĝi tian situacion sekrete. Ambaŭ celas malmultigi kverelojn. Gefiloj kelkfoje preferas malkuniĝon ol daŭrajn kverelojn. Se ili scias junaj ke malkuniĝo povos okazi, tio estos por ili pli akceptebla. Mi mem restis 75 jarojn "fidela" al la geedziĝo (oficiala), dum ni ambaŭ havis niajn eksterajn amoaferojn. Aliaj homoj agas alie. Nur malmultaj homoj kapablas sekse ami unu personon dum la vivo, sed pluraj el ili kapablas ordinare tre ami partneron pro karaktero aŭ historio. Tio samas ĉe oficiala same kiel ĉe neoficiala geedziĝo.

Kun tiuj multaj manieroj kaj devigoj, mi trovas plej utila geedziĝi neoficiale. Tio solvas multajn problemojn. **Unue** la gefiloj avertatas jam sufiĉe junaj ke rompiĝo povos okazi, kaj la ŝoko do estos malpli forta. **Due** la gepartneroj jam antaŭe povas prepari sin pri ia ajn kazo de amoperdo. **Trie** neniu partnero povos kredi, ke eterna amo aŭ fidelo estos la leĝo por formi familion. **Kvare** ne estas morale ĝusta postuli ke partnero restu fidela kaj ke tial estus morala rajto puni la nefidelan partneron, kelkfoje per mortigo.

Cetere la ago de oficiale esti geedziĝo kaj la ago de neoficiale loĝi kune kaj formi familion estas ekzakte la samaj, kaj do ambaŭ devus havi unu nomon, nome "geedziĝi". Se oni volas distingi inter la du, unu nomiĝas "oficiale geedziĝi" kaj la alia "libere geedziĝi". Kaj ĉar la du estas la sama ago, oni kutime ne bezonas per vortoj distingi inter la du. Ĉiuj tiuj kunvivadoj estas feliĉaj (aŭ malfeliĉaj) geedziĝoj. Kaj se oni volas rompi la kunvivadon, unu okazas oficiale, ofte en la kortumo, kaj la alia okazas libere. Ambaŭ pace, mi esperas. Do mi gratulas ĉiujn geedziĝojn, kelkajn mallongaj kaj multaj longaj kaj ofte eternaj. *Marcel Leereveld.*



La retradia programo de februaro la unua, 2021

[Amuza filmeto el Aŭstralio | Esperanta Retradio](#)

**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**

*Roger Springer*




**3ZZZ**. Se vi interesiĝas pri la esploroj en spaco , la elsendo de la 8a de februaro 2021 plaĉos al vi. Ni malkovras alian vizaĝon de Usono , ne menciita en la amaskomunikiloj, pere de la historio de psikedelismo en Usono kaj la informoj de Anton Oberndorfer pri la graveco de Usono por Esperanto. *Franciska Toubale*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***